

Sennaciulo

Manifestacio por rememori viktimojn

origina foto ĉe : www.migrantssinkorea.net



LA BRULMORTO DE MIGRINTAJ LABORISTOJ EN URBO JEOSU

Migrintoj en manifestacio

origina foto ĉe : www.migrantssinkorea.net



LA MURO DE SARKOZY



Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97 Retadreso: satesperanto@free.fr. TTT-paĝoj: <http://www.satesperanto.org> Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la labor-horoj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s

Redaktas: Redakta Komitato - Cyril Orsingher, Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Vinko Markov, Vito Markov, Nikolao Gudskov, Gary Mickle kaj Jacques Schram.
Ĉefredaktoro : Cyril Orsingher
Enpaĝigisto: Krešimir Barković
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

r

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567



Nia dosiero: Internacia Solidareco.

Iom nekutima estas la ĉi-monata dosiero, kiu, escepte de la artikolo de Paz, konsistas el mallongaj enkondukoj al la kongresaj debatoj.

Monda Solidareco kontraŭ la Malsato

La Solidareco estas sendube unu el la plej belaj konceptoj pri la interhomaj rilatoj. Ĝi distingiĝas el amikeco, en kiu ĉio estas akorda eĥo kaj admiro, kaj el frateco, en kiu neniu elektis siajn kunulojn. Solidareco estas unika sento de plene konsentita kunligiteco inter homoj, kiuj frontas situacion gravan por ĉiuj, situacion kiu eĉ povas endanĝerigi la koncernatojn, la « interligitojn ».



Ĉar la eventoj kaj danĝeroj ignoras la landlimojn, tial same la solidareco ignoru ĉiujn limojn, ĉu naciajn, ĉu lingvajn, ĉu aliajn. Antaŭ kelkaj jardekoj oni kutime parolis pri « internacia » solidareco. En la nuna tutmondiĝa erao ankaŭ la solidareco estas konsiderata

kiel « monda ». Oni ŝanĝis ne nur la vorton, sed ankaŭ la koncepton, ĉar la solidareco koncernas ne plu ŝtatojn el diversaj nacioj, sed homojn kunloĝantajn en la sama mondo. Tiu ŝanĝo venas de analizo, kiu difinas, ke la nunaj danĝeroj antaŭ kiuj la homoj frontas, estas ĝeneralaj, mondaj, kaj ke la savo necesigas, ke la homoj intersolidariĝu je monda nivelo.

Tiun analizon faris jam en la kvardekaj-kvindekaj jaroj la fruaj Civitanoj de la Mondo.

La monda solidareco povas ampleksi multajn aspektojn de la vivo kaj de la medio. Pro la granda malekvilibro de la ekonomio, kiu pli kaj pli graviĝas, multaj homoj frontas la plej gravan problemon, kiu fontas el tiu malekvilibro : la manko de nutraĵoj. Pro tio en 1982 grupo da Civitanoj de la Mondo proponis konsistigi asocion de solidareco surbaze de plena egaleco inter ĉiuj membroj. La 25jara sperto de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato povus profiti al la konsistigo de novaj solidarecoj kontraŭ aliaj problemoj.

La debaton enkondukos Daniel Durand.

Debato pri enmigrado

Pli kaj pli pendas la malbona ombro de la ekstremdekstraj pensoj super nia tergloblo.

Evidente ĉiuj homoj rajtas havi politikajn opiniojn, kiuj estas en demokratio liberaj. Tamen en ĉi tiu grupo de ekstremdekstruloj kreskas la ideo de rasismo kaj maltoleremo. La konataj politikaj grupoj en pluraj landoj ne plu

timas publike propagandi ideojn kiuj en demokratio sistemo ne eblas. Demokratio devas esti tiel, ke ĝi prezentas al la homoj sistemon kiu donas al ĉiu, sendepende de la deveno, koloro aŭ filozofio, liberecon agi kaj esti.

Kiam ni aŭskultas la retorikon de kelkaj politikistoj, gvidantoj de ĉi tiuj ekstremdekstraj partioj, ni aŭdas